ISNN 0949-9830

# FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA

Nr. 22 Eberswalde 1990-04-25

1. Raporto pri la kunveno de la IFRE- estraro en Hilburghausen (GDR) je la 9a de aprilo 1990

1.1. Partoprenintoj: J.A: Pachter; d- ro Simon; I. Ullrich

1.2. Temoj kaj decidoj

1.2.1. Plua evoluo kaj firmigo de la strukturo de IFRE.

La politikaj kaj ekonomiaj ŝanĝadoj en la ŝtatoj de la “Orienta Bloko” faras novajn kondiĉojn kaj ŝancojn por la laboro de esperantistoj. Ni intencas utiligi tiujn ŝancojn por firmigi IFRE, publikigi pli vaste la rezultojn de nia laboro kaj evoluigi la kunlaboradon kun kunvenaj partneroj. Decidoj pri prilaborado de proponoj ĝis la ĉefa IFRE- kunveno en septembro 1990

+ Kronologia priskribo de la historio de IFRE. Responsulo: d-ro Simon
+ Statuto de IFRE. Responsulo: J. A. Pachter
+ Kontrakto pri kunlaboro inter AIS kaj IFRE. Responsulo: J. A. Pachter

1.2.2. Programmo pri la kunveno de IFRE-anoj okaze de la Oka Sennacieca Universitata Sesio (SUS 8)

15.09.1990 Vojaĝo al Bialystok

16.09.1990

9.00- 18.00 Antaŭkurso kadre de la prelegserio “Ekologio kaj protektado de la natura medio”, prelegoj pri “Aktualaj problemoi de la arbara sanstadio”:

J. A. Pachter: Arbarmortado.

d-ro Simon: Deponajoj fare de la atmosfera precipitajo en arbaroj de la norda parto de GDRI.

I. Ullrich: Ekologia inventarado de la arbara sanstato rilate novspecajn arbardifektojn kaj rezultoj en GDr

I. Danilin: Ekologiaj aspektoj de forstuzado en Norda Silberio

S. Oroszi: Arbarmortado en la hungara forstliteraturo

k. a.

17.09 1990

9.00 Terminologia kurso

19.00 Ĉefkunveno de IFRE-anoj

18.09.1990 Ekskurso al la praarbaro de Bialowieza

19.09.1990

9.00 Forst- terminologia kunsido

19.00 Akademia forumo

1.2.3. Pli precizaj informoj pri aliĝo al la kunveno de IFRE-anoj en Białystok

1. Oni aliĝu partopreni en SUS 8 ĉe

Akademio Internacia de la Sciencoj
Prezidanta Sekretariejo
Kleinenberger Weg 16 B
D- 4790 Paderborn

2. La aliĝ-kontizon 0,3 AKU (=30.-DM aŭ egalvaloro) pagu sur konto Poŝtĝiro 2051- 305, Bankkodo 250 100 30, poŝtĝirooficejo Hannover kaj sendu kopion de la ĝirilo al la Prezidanta Sekretariejo. IFRE-anoj el nepagipovaj landoj petu helpon senpere de la Dr. Klemm-Fonduseto skribante al helpsekretario de la Dr. Klemm-Fonduseto:
   Bac. h. c. G. Pirlot
   Steenbakkersstraat 21
   B- 8400 Oostende

3. Oni sendu aliĝilon rilate loĝadon al
   Teknika Universitalto de Białystok
   Wiejska 45 a
   Pl- 15351 Białystok

4.Informu pri via intenca partopreno:
   IFRE- sekretariejo
   d-ro K.- H. Simon
   C.- v.- Ossietzky- Str. 21
   Eberswalde-Finow
   DDR-1300

Por malaltigi la vojaĝ-konstojn provu, ĉu vi povas formi vojaĝ-komunumon kiel SUS-partoprenantoj el FRG jam faris.

2. Alia informo
   La internacia forstfaka foiro INTERFORST 90 okazos en München de la 1a ĝis la 8a de julio. Pliajn informojn petu ĉe kolego J. A. Pachter.

**Aldonaĵo:** Decimal- klasifikado pri la forsta fako laŭ la Oxford- sistemo p. 28- 40